

Ludwig Uhland, La kapelo <i>tradukita de Ludwig Lazarus Zamenhof</i>	Ludwig Uhland, La kapelo <i>tradukita de Hans- Georg Kaiser</i>	Ludwig Uhland, Die Kapelle <i>tradukita de Man- fred Retzlaff</i>	Ludwig Uhland, La kapelo <i>tradukita de Man- fred Retzlaff</i>
Supre staras sur la monto La silenta kapeleto, En la valo, ĉe la fonto Ĝoje kantas paŝtisteto.	Supre tronas sur la monto La kapelo en kviet'. En la valherbej' ĉe l' fonto Ĝoje kantas paŝtknabet'.	Droben stehet die Kapelle, Schauet still ins Tal hinab. Drunten singt bei Wies' und Quelle Froh und hell der Hirten- knab'.	Supre staras la ka- pelo Sur la pinto de la mont', La paŝtist' en suna helo Ĝoje kantas ĉe la font'.
Sonorado, mortkanta- do Nun eksonas tra l' si- lento, - Haltas knabo en kan- tado Kaj aŭskultas kun atento.	Kun funebra sonorilo Ektimigas mortkan- tad'. Finas tuj la ĝojjubilo De la knabo ĉe l' konstat'.	Traurig tönt des Glocklein nider, Schauerlich der Leichen- chor; Stille sind die frohen Lie- der, Und der Knabe lauscht empor.	Triste la sonorileto De funebro sonas de La altaĵ' tra la kvie- to, La paŝtist' jam kan- tas ne.
En la tombojn de l' monteto El la valo ĉiu venos. Ankaŭ vin, ho paŝtisteto, Oni iam tien prenos.	La ĝojintoj post la morto Supren en la tombojn venos Paŝtoknabo, laŭ la sorto, jen ja Morto vin eĉ prenos.	Droben bringt man sie zu Grabe, Die sich freuten in dem Tal: Hirtenknabe, Hirtenknabe! Dir auch singt man dort einmal.	Ĝin ne povas aŭdi soni La gajuloj post viv- fin'. Ho, paŝtisto, iam oni Portos supren an- kaŭ vin.
...	...	...	...

Traduko de la Germana poemo "Die Kapelle" de LUDWIG UHLAND (\*1787.04.26 - †1862-13-11) en Esperanton de LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF (Ludoviko Lazaro Zamenhofo, \*1859-12-15 - †1917-04-14).

Arg-639-1288 (2012-11-02 16:27:28)

Tiu ĉi poem-traduko troviĝas ankaŭ en [www.literaturo.dk/kapelo.htm](http://www.literaturo.dk/kapelo.htm), ene de la listo <http://www.literaturo.dk/enhavo.htm>.

Traduko de la Germana poemo "Die Kapelle" de LUDWIG UHLAND (\*1787.04.26 - †1862-13-11) en Esperanton de HANS-GEORG KAISER (Cezar, \*1954-05-21).

Arg-639-1290 (2012-11-02 09:10:10)

Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en <http://www.cezarpoemtradukoj.cezarpoezio.de/213.html>.

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas LUDWIG UHLAND (\*1787.04.26 - †1862-13-11).

Arg-639-1286 (2012-11-02 16:53:38)

Vidu:[http://meister.igl.uni-freiburg.de/gedichte/uhl\\_103.html](http://meister.igl.uni-freiburg.de/gedichte/uhl_103.html).  
Pri la poeto vidu la vikipediejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Ludwig\\_Uhland](http://de.wikipedia.org/wiki/Ludwig_Uhland). La poemo estas kantebla laŭ melodio verkita de Conradin Kreutzer. La melodio estas aŭdebla tie: <http://www.musicanet.org/robokopp/Lieder/drobenst.html>.

Traduko de la Germana poemo "Die Kapelle" de LUDWIG UHLAND (\*1787.04.26 - †1862-13-11) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04).

Arg-639-1287 (2012-11-02 08:49:45)

Pri la aŭtoro vidu ankaŭ la vikipedian retejon [http://en.wikipedia.org/wiki/Ludwig\\_Uhland](http://en.wikipedia.org/wiki/Ludwig_Uhland).